

A solis ortus cardine

Brevier-Himno

Kristnaska tempo > antaŭ Epifanio > matena laŭdo

*A solis ortus cardine
adusque terræ limitem
Christum canamus principem,
natum Maria Virgine.*

*Beatus auctor sæculi
servile corpus induit,
ut carne carnem liberans
non perderet quod condidit.*

*Clausæ parentis viscera
cælestis intrat gratia;
venter puellæ baiulat
secreta quæ non noverat.*

*Domus pudici pectoris
templum repente fit Dei;
intacta nesciens virum
verbo concepit Filium.*

*Enixa est puerpera
quem Gabriel prædixerat,
quem matris alvo gestiens
clausus Ioannes senserat.*

*Feno iacere pertulit,
præsepe non abhorruit,
parvoque lacte pastus est
per quem nec ales esurit.*

*Gaudet chorus cælestium
et angeli canunt Deum,
palamque fit pastoribus
pastor, creator omnium.*

*Iesu, tibi sit gloria,
qui natus es de Virgine,
cum Patre et almo Spiritu,
in sempiterna sæcula.*

Amen.

latina T: Sedulius, 5-a jarcento

Al turno-punkt' de sun-leviĝ'
kaj ĝis ekstremo de la ter'
ni kantu al Princ' Kristo: Lin
Maria naskis, Virgulin'.

Benata la Farint' de l' mond'
sin vestis per ĉi sklava korp',
por savi karnon per la karn',
ke ne perdiĝu kreitar'.

Ĉastegan ventron de patrin'
la graco trafas el ĉiel',
knabina ventro pro sekret'
pezegas: ŝi ne konas ĝin.

Do domo de pudora kor'
tuj iĝas templo nur por Di':
la ne-tuŝitulin' sen vir'
koncipas filon en uter',

En nasko-spasmoj naskas Lin,
kiun anoncis Gabriel' –
kaj supren-salte jam Baptist'
rekonas Lin el panja sin'.

Fojn' por kuŝado, kial ne?
li ne malŝatas pri manĝuj':
per iom lakto nutras sin,
dank' kiun manĝas ĉiu bird'.

Ĝojegas ĉielula ĥor',
anĝeloj kantas nun por Di'
kaj al paŝtistoj la Paŝtist'
montriĝas: ĉies Li kreint'.

Jesu', la gloro jen por vi
– ĉar Vi naskiĝis el Virgin' –
kun Patro kaj Vivig-Spirit'
por ĉiam-daŭra la tempeg'.

Amen.

E: Gerrit Berveling,
1986 en Tero kaj Ĉielo Kantu VIII/112,
2001 en ADORU 249